

Pri Gresillon

Ĉu vi

« Ĉu vi jam aŭdis ridojn, kantojn, viglajn konversaciojn esperantajn, resonantajn en ĉiuj anguloj de granda domo ?

« Jes, en multaj lokoj.

« Ĉu vi jam gajnis multajn amikojn en kelkaj horoj ?

« Tio povas okazi.

« Ĉu vi jam vivis en tia etoso, kia ekzaltas la korojn kaj naskas amikecan atmosferon en kiu estas dolĉe baniĝi ?

« Jes, kompreneble.

« Ĉu vi okaze povis en iu momento elekti inter promenado, duondormo sur herbo aŭ sub arboj, pilkludo, banado, eĉ fiŝkaptado ?

« Jes, tio estas ebla.

« Ĉu vi havis la okazon lerni multon pri diversaj aspektoj de la internacia vivo aŭ de la vivo en aliaj landoj rekte de la enloĝantoj de tiuj landoj ?

« Jes, ĉar mi legas kaj posedas radio- kaj televido-aparatojn.

« Ĉu vi jam vekiĝis aŭdante la kanton de multaj birdoj, kiuj anoncas, ke la tago estos bela ?

« Jes, sufiĉe ofte.

« Ĉu vi matene promenis tra herbejoj kaj arbaroj ĝuante la freŝan aeron, rigardante la etajn florojn ankoraŭ kliniĝantajn sub la pezo de roso, aŭ la longaj aleojn, kies ekstremoj stompigas malantaŭ nebul-vualo ?

« Jes, kiam mi estas en la kamparo dum la ferioj.

« Ĉu vi... ?

« Sed, kial tiom da demandoj ?

« Permesu al mi fari lastan demandon : Ĉu vi jam en via vivo ĝuis ĉion samtempe : la florojn, la herbon, la naĝadon, la pilkludon, la kanton de birdoj, la amikecan etoson, la kulturigon en pure internacia esperantista atmosfero ?

« Mi opinias ke mi ne havis tian ŝancon.

« Tio pravas, ke vi neniam vizitis la Esperantistan Kulturdomon. Ankoraŭ ne estas tro malfrue sed.

ALIĜU TUJ

ĉar memoru, ke multaj amikoj revizitas Gresillon. Dum la Paska periodo la direktoro devis peti gesamideanojn loĝi en hotelo en la apuda urbeto. Timu, ke tio okazos ankaŭ al vi.



Ne forgesu PAGI VIAN ABONON al :

Micard Henri - Kulturaj Kajeroj

Epineux-le-Séguin (May.)

C.C.P. Nantes 2349-62

La alilandanoj pagu al la supra konto aŭ al sia peranto (vidu liston sur la lasta kovril-paĝo).